# 49a cirkulero Esperanto-RLP

dato: 16.10.2012

**Enhavo**


1. **La dua EMA ĉe meza Rejno estis sukceso**
2. **Kultura Semajnfino de SEL en Homburg**
3. **Esperanto aktivecoj en Koblenco**
4. **Raporto de Dirk Hartmann, iama aktivulo el Kaiserslautern, el Ĉinio**
5. **Esperanto-RLP bei der Europa-Unio Rheinland-Pfalz**


## 1) Ankaŭ la dua EMA ĉe meza Rejno estis sukceso.

Jen raporto pri ĝi:
25 esperantistoj el kvar lando partoprenis la 2an Esperantistan Migradon Aŭtunan (2a EMA). La aranĝo de GEA okazis de la 30an de septembro ĝis la 05a de oktobro.

En aŭtuna suno de la meza Rejnlando la grupo migris sub lerta gvidado de Rudolf Fischer. De Kaub en kvar etapoj la grupo iris al Rüdesheim, ĉiam sur la fama kaj intertempe tre populara migropado „Rheinsteig“ renkontante la belegajn panoramojn , imponajn burgojn kaj multkolorajn vitejojn. Ofte la internacia grupo renkontis vinberrikoltantojn, de kiu ili ricevis kelkajn berojn por gustumi.

Vidinte la verdajn flagojn ĉe la grupo kaj aŭdinte „iun strangan lingvon“ la preterpasantoj alparolis la grupon kaj montras intereson pri nia lingvo. Ne malofte anoj de la grupo „ofertis“ survojan kurseton pri la lingvo.

Vespere la partoprenandoj de la 2a EMA aŭskultis prelegojn de Petro Chrdle kaj Rudolf Fischer. Chrdle prelegis pri siaj libroeldonejo kaj la vivo de la fratoj Čapek. Fischer raportis pri siaj spertoj sur la Jakoba vojo en Hispanio. Samtempe ni povas ĝui la belan noktan panoramon desur nia tranoktejo, la Elsenburg en Kaub.

La venontjara 3a EMA tre verŝajne okazos ĉe la Mozelo apud Zell. Ni jam fiksis la daton: de dimanĉo, la 6a, ĝis vendredo, la 11a de oktobro 2013.

## 2) Kultura Semajnfino de SEL en Homburg

Versajne lastfaje okazos Kultura Semajnfino en Kardinal-Wendel-Haus, 66424 Homburg/Saar, Kardinal-Wendel-Straße 10 de vendredo, la 19a de oktobro, ĝis dimanĉo, la 21a de oktobro 2012.
Ne maltrafu tiun unikan aranĝon kaj aliĝu tuj ĉe: SEL Oliver Walz, Richard-Wagner-Str. 38, 66482 Zweibrücken, telefono: 06332/43843 oliver.walz@esperanto-reto.eu

## 3) Esperanto- aktiveco en Koblenco

Raportis el KOBLENCO nia membro Dr. Marrhias Hecking:
„La 30-an de augusto mi prezentis malgrandan prelegon pri Esperanto ĉe la popola altlernejo de Koblenco. Ĉeestis 6 personoj. Dum tiu prelego disvolviĝis intensa diskuto pri nia lingvo, ĝia historio kaj la esperanta kulturo. Por la kurso bedaŭrinde finfine nur estis 2 partoprenontoj. Tio ne sufiĉis por okazigi la kurson. Mi planas nun dum la printempa semestro oferi intensan kurson, kiu daŭros unu aŭ du semajnfinojn. Kaj memkompreneble denove informa prelego antaŭe. Kiam la datoj estas fiksitaj mi sciigos vin.“ M. Hecking

### 4) Raporto de Dirk Hartmann, iama aktivulo el Kaiserslautern, el Ĉinio

„ Germana Karaj geamikoj,
Mi salutas vin el Ĉinio! Ekde kelkaj monatoj mi nun loĝas en Ĉinio, en la malgranda urbo Ziwu . Mi kunlaboras kun universitato ĉi tie, ni organizas germanlingvajn kursojn por ĉinaj lernantoj, kiuj volas studi en Germanujo. Ziwu estas apud de Xi'an, en Esperanto Ŝiano, la ĉefurbo de la provinco Sha'anxi (Ŝanŝio). Ŝiano estas konata por siaj terakotaj militistoj, estas la plej granda urbo en okcidenta Ĉinio kun pli ol 8 milionoj da loĝantoj.



Nia universitato havas pli ol 20.000 da lernantoj. Mi loĝas en la maldekstra domo en simpla cxambro. La vojo al Ŝiano vere ŝajnas mondvojaĝon. Unue mi devas preni la buson por iri al la suda rando de Ŝiano, tio daŭras 45 minutojn, tiam mi prenas la metroon por iri al la centro de la urbo, ankoraŭ pli ol 30 minutoj – kvankam daŭras longe la veturo vere estas malmultekosta, nur kostas 50 cendoj.



La vidindaĵoj ĉi tie estas nekalkuleblaj. Kiam la unua imperiestro Qin Shi Huang Di unuigis la lando en la




jaro 221 antaŭ la Kristo, Ŝiano fariĝas la unua ĉefurbo de la nova lando Qin. (Ĉu vi scias, ke la hodiaŭa nomo Ĉinio venis de la vorto Qin?). Ŝiano ankoraŭ estas la komenc-loko de la silka vojo en Ĉinio.

Ĉu vi volas ekscii pli ol mia nova vivo? Mi volonte skribos pli, se vi konsentus. Por hodiaŭ nur ĝis ĉi tie. Elkorajn salutojn el Cxinio"
Dirk Hartmann

### 5) Esperanto-RLP bei der Europa-Unio Rheinland-Pfalz

Bei der Vortrags- und Diskussionsveranstaltung zum Thema „Mehr Europa ist die Zukunft! der Europa-Union Deutschland, Landesverband Rheinland-Pfalz e.V. in der Ev. Familienferien- und Bildungsstätte Ebernburg in Bad Münster am Stein-Ebernburg am

Samstag, den  Samstag, 20. Oktober 2012 wird Esperanto-RLP von unserem Mitglied Dr. Wolfgang Schwanzer aus Mainz vertreten.

Landa Ligo Rejnlando-Palatinato
Esperanto-RLP
Wolfgang Bohr
Johannes-Kirschweng-Straße 11
**D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler**
**Germanujo**
**retpoŝto:  wolfgang.bohr@esperanto.de**